

Ni rememoras

Antaŭ dek jaroj mortis nia kluba kasistino Marta Lorková, antaŭ 15 jaroj forpasis doktoro Jaromír Šikula kaj antaŭ 20 jaroj nia multjara prezidanto Josef Vondroušek.

Marta LORKOVÁ naskiĝis la 24-an de novembro 1924. Ŝi laboris en la 1950-aj jaroj en la kluba junulara teatra rondeto kaj ankaŭ poste havis en la klubo kulturajn programojn, ofte kun deklamado de poezio. Profesie ŝi estis bank-oficistino kaj tial ŝi laboris kiel kluba kasistino kaj apartenis al la kluba komitato. Pro siaj kulturaj interesoj ŝi helpadis al la prezidanto Josef Vondroušek kun preparo de koncertoj kaj aliaj klubaj aranĝoj. Ŝi mortis la 23-an de julio 2005.

Jaromír ŠIKULA naskiĝis la 29-an de majo 1924. Li estis universitata docento, botanikisto, instruisto de Veterinara kaj Farmacia Altlernejo en Brno. Plurfoje li aperis en televido kun konsiloj pri botanikaj aferoj. Pri la samo li prelegis ankaŭ por esperantistoj en nia klubo. Li postlasis esperantlingve tri Indeksojn de semoj, artikolojn pri Botanika ĝardeno, Nutraĵoj sen veneno, Kulto de plantoj kaj floroj, Kuracaj plantoj en la historio kaj nuntempo, Tradicia kaj moderna medicinoj. Sed kompreneble lia ĉefa verkado estis ĉeĥlingva, precipe lernolibroj por studentoj, nome Botaniko veterinara, Planto kaj medio, Veterinara botaniko kaj furaĝistiko, Veterinara botaniko kaj fundamentoj de agrikulturo, Legomoj, plantoj, radikaj kaj kuracaj, 25 jaroj de ĝardenistiko en Brno. Li ankaŭ kunlaboris pri Agrikultura enciklopedio. Liaj eksaj studentoj verkis pri li broŝuron. Doktoro inĝeniero Jaromír Šikula mortis la 19-an de majo 2000, en la tago de sia 76-jariĝo.

Josef VONDROUŠEK naskiĝis la 1-an de decembro 1904. Profesie li estis bank-oficisto. Kiel esperantisto li estis la plej grava persono en la historio de nia klubo. Li estis honora kluba prezidanto, honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj ankaŭ honora membro de Universala Esperanto-Asocio.

Li naskiĝis kaj travivis sian vivon en Brno. Esperanton li lernis en la jaro 1922, do kiel 18-jarulo. La movada vivo en Brno, ĝis tiam malvigla pro idista konkurenco, intensiĝis, kiam li en 1929 kiel 25-jarulo fariĝis sekretario de la klubo, al kiu li altiris multajn el siaj propraj kursanoj. Li prezidis la klubon inter [1945](#) kaj [1985](#) kaj redaktis ĝian bultenon dum kvin jardekoj. De post [1931](#) li estis komitatano de Ĉeĥoslovakia Asocio Esperantista. Li estis inter la organizantoj de du ĉeĥoslovakaj kongresoj en Brno ([1935](#), [1950](#)) kaj de la fondkongreso de [Ĉeĥa Esperanto-Asocio](#) (ĈEA) en 1969. La asocio elektis lin sia honora membro en [1979](#). Li servis ankaŭ kiel komitatano de UEA ([1946-1952](#)) kaj, dum 65 jaroj ekde [1930](#), kiel delegito. Kvar jarojn li redaktis E-rubrikon en ĉeĥlingvaj gazetoj „Ruch“ kaj „Nový Lid“ (antaŭ la [dua mondmilito](#)).

Josef Vondroušek gvidis multajn E-kursojn kaj instruis E-historion kaj literaturon al somer-kursanoj en [Rožnov pod Radhoštěm](#) (1949-52) kaj poste 25 jarojn en la Somera E-Tendaro de [Lančov](#), por kies bezono li verkis ĉitemajn kompendiojn en la ĉeĥa kaj Esperanto.

Dum multaj jaroj li kunprizorgis la E-ekzamenojn de ĈEA kaj havis meriton pri ilia alta nivelo. Li prelegis en la Somera E-Universitato de Gyula (Hungario) kaj en aliaj aranĝoj, kiel Internacia Foira E-Renkontiĝo en Lepsiko.

Josef Vondroušek ofte kontribuis al E-revuoj kaj de post la dua mondmilito multe tradukis el la ĉeĥa literaturo.

Josef Vondroušek prizorgis, ke dum niaj klubaj vesperoj ĉiam estas iu kultura aŭ prelega programo, kiun aranĝas la klubanoj mem. Ni nun klopodas daŭrigi tiun tradicion, kiu por nia klubo fariĝis

memkomprena, sed por aliaj kluboj ĝi normala tute ne estas. Li ankaŭ sciis bone verki kluban bultenon, parte esperantlingve, parte ĉeĥlingve, ĉar li dissendis ĝin al ĵurnalaj redakcioj. Per mallongaj frazoj li kapablis informi, kio grava por Esperanto okazis enlande kaj eksterlande, tial legante lian bultenon vi povas ekscii, kio grava okazis en koncerna jaro.

Liaj plej gravaj meritoj por la tutmonda Esperanto-movado estas liaj tradukoj el la ĉeĥa literaturo. En la kvindekaj jaroj, do post la milito, li parkere lernis Plenan Vortaron, por disvastigi sian vortprovizon. Li tradukis ĉefe el sia plej amata aŭtoro Karel Čapek kaj poste el aŭtoroj bonhumoraj, asertante, ke esperantistoj bezonas esti gajaj, ĉar da malagrablaj aferoj estas en la vivo sufiĉe multe. Tamen li rifuzis esperantigi el Jaroslav Hašek, ĉar por lia ĝentila kaj ĝentlemana gusto Hašek estis tro vulgara. Kaj kiam iu franca esperantisto skribis al li, ke Ŝvejk estas la plej granda verko de la ĉeĥa literaturo, kiun li devus esperantigi, sinjoro Vondroušek tion sentis kiel ofendon kontraŭ Karel Čapek kaj rifuzis. Sed li esperantigis sian amatan libron **Saturnin** de Zdeněk Jirotka, **Ĝojoj de mia vivo** de Jan Šmíd kaj librojn de Miloslav Švandrlík, nome **Edzinigebla knabino**, **Zorgoj de kronitaj kapoj** kaj **Marlupo kaj gaja vidvino**. Kaj infanan libron **El notlibro de sankta Petro** de Jarmila Hašková, edzino de Jaroslav Hašek.

Li amis ankaŭ historiajn verkojn, kaj traukis ilin, nome **Malnovaj ĉeĥaj mitoj** de Alois Jirásek, **La propra biografio de Karolo la Kvara**, **Super valoj mateniĝas** de František Kožík kaj **Ŝtono kaj doloro** de Karel Schulz pri Mikelanĝelo. Tiun li bedaŭrinde ne sukcesis fini. Inter liaj tradukoj ni trovas ankaŭ teatraĵojn **Ondro kaj drako** de Viktor Dyk, **Urso** de Čechov, verŝajne tradukita el ĉeĥa traduko, ambaŭ por la kluba junulara teatro en la kvindekaj jaroj. Post la velura revolucio li esperantigis dramon **Aŭdienco** de Václav Havel, kiu estis ludata dum nia Universala Kongreso en Prago en 1996. Sed li bedaŭrinde ne ĝisvivis ĝin. Josef Vondroušek provis eĉ poezian tradukon **Primoloj** (Petrklíče) de Svatopluk Čech. El Vítězslav Nezval li tradukis mallongan rakontadon **El mia vivo** kaj fragmenton el la komedio **Kaŝludo sur la ŝtuparo**.

Kiel mi jam diris komence, lia ĉefa kaj plej amata aŭtoro estis Karel Čapek. Dramoj **Afero Makropulos** kaj **El vivo de insektoj**, porinfana libro **Naŭ fabeloj**, bonhumoraj vojaĝpriskriboj **Italaj leteroj**, **Anglaj leteroj**, **Ekskurso en Hispanion**, trilogio de romanoj **Hordubal**, **Meteroro**, **Ordinara vivo**, filozofiaj bonhumoraj rakontoj **Libro de apokrifoj** kaj detektivaj **Rakontoj de la unua poŝo kaj Rakontoj de la dua poŝo**. Kiel ĉefverkon de Karel Čapek kaj de sia traduka laboro li konsideris satiran romanon **Milito kontraŭ Salamandroj**.

Inter liaj tradukoj estas ankaŭ kelkaj nebeletraj: Václav Chaloupecký: **Karolo la IV-a kaj Bohemio** kaj Zdenko Křimský: **Sociologia esploro de sintenoj al Esperanto**.

Liaj propraj broŝuroj verkitaĵoj por Lančov estas **Historio kaj biografioj**, **Historie a spisovatelé** **Historio kaj literaturo de Esperanto**. Konservigis ankaŭ liaj tekstoj **O překládání** kaj **Historio de Esperantista klubo en Brno**, kiu fariĝis bazo de nia kluba retejo pri la kluba historio.

Sinjoro Vondroušek esperis, ke li ĝisvivos la Universalan Kongreson en Prago. Komence de decembro 1995 ni festis ĉi tie en la klubejo lian 91-an jaron, sed tiam li jam plendis, ke li iomete malsanetas, eble lin atakas angino. Bedaŭrinde por lia alta aĝo ĝi estis mortiga kaj li forpasis la 6-an de decembro. Ni ĉiuj estis surprizitaj, ĉar li aspektis apenaŭ je 70 jaroj kaj neniu volis kredi, ke li havas jam naŭdek.